Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo

ĵaŭdon la 22-an de oktobro 2020 per Zoom

(aprobita en la interkonsiliĝo la 26-an de novembro 2020)

Ĉeestis

Claude Rouget, Amelie Matt kaj Mario Machlik (Tromsø)

Herman Ranes kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen (Trondheim)

Bård Hekland (Bergen)

Lars Sandbakk (Stavanger)

0. Tagordo

La tagordo estis dissendita la 18-an de oktobro. La tagordo aprobiĝis.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 24-an de septembro

La malneta protokolo estis dissendita la 25-an de septembro. La protokolo senŝanĝe aprobiĝis.

2. Jarraporto 2019/2020

Post nia pasinta kunsido ni memoriĝis pri ĉeesta kurso en Skien, gvidita de Henrik Håndlykken. Informoj pri ĝi estis aldonita al la jarraporto. Ankaŭ estis faritaj kelkaj etaj lingvaj ŝanĝoj. La jarraporto publikiĝos en NE-isto 5/2020.

Decido: La jarraporton de 2020 ni celu pretigi ĝis la fino de februaro. Ĝi estu dissendata per NE-isto antaŭ la landa kongreso.

Ekestis diskuto pri la landa kaj skandinavia kongresoj, vidu sub Eventualaĵoj.

3. Seminario 2020

La seminario okazos sabaton la 21-an de novembro inter la 15-a kaj 17-a. Eventuale, interesatoj povos resti diskutante post la fino de la oficiala seminario.

La seminario okazu per Zoom, Bård teĥnike administros. Partoprenantoj anonciĝu al la oficejo. Ni anoncos la aranĝon kaj en Norvega Esperantisto, kaj en nel-informoj, kaj ankaŭ al la najbarlandaj asocioj. Ni provos venigi ankaŭ NJE-anojn. Stefan petas, ke ni sendu al li la retpoŝtajn adresojn de la partoprenontoj, tiel ke li povos sendi preparajn materialojn.

Ni starigis seminarian komitaton: Mario, Bård, Douglas kaj Stefan, kiuj kunordigos la aranĝon.

4. Nova broŝuro, aŭ kiel ni informu?

Bård faris esplorojn de ekzistantaj broŝuroj. Resumo: Ekzistas kaj ampleksaj, tekstoplenaj broŝuroj (ekz. Malkovru Esperanton, PakEO), mallongaj tekstoplenaj (ekz. Ĝisdate pri Esperanto) kaj mallongaj, pli koloraj broŝuroj kun malpli da teksto (ekz du danaj broŝuroj). Sed li ne trovis bonan kaj belaspektan broŝuron speciale faritan por multlingvigo.

La estraro diskutis kiucele ni volas broŝuron, kaj kiajn enhavon kaj aspekton ĝi havu? Konkludo: Ni donas prioritaton al mallonga, kolora broŝuro kiu akcentu kion oni povas fari per Esperanto. Ĝi donu kelkajn lingvajn ekzemplojn, sed ne estu kurseto. Gravas, ke ĝi aspektu moderne kaj alloge kaj ke ĝi estu ne tre multekosta. Ni volas presi ĝin, ĉar kopiado ne donas la saman kvaliton. Supozata kosto por unu ekzemplero estas proksimume 3 kronoj, ankaŭ sen tre alta eldonkvanto.

Se konsiderata utila, ni poste povos fari pli tekstoplenajn prezentojn pri la movado aŭ la lingvo, kiujn eblos kopii. Sed ampleksajn materialojn interesatoj ankaŭ trovos rete.

Amelie montris proponon kiun ŝi faris dum la kunsido. **Decido**: Bård plue esploros pri eblaj tekstoj por adaptiĝo. Li poste sendos la tekstojn al Amelie, kiu faros broŝurproponon. Gravas, ke ni rajtu uzi kaj tekston kaj grafikaĵojn.

5. Pri Esperanto en NRK Rogaland

La 14-an de oktobro dissendiĝis 3,5 minutan programeron pri Esperanto en la regiona televida elsendo de NRK Rogaland. Estis intervjuata interalie Lars. La programero estis farita de ĵurnalisto Magnus Stokka. Ĝi estos spektebla en la arĥivo de NRK: https://www.nrk.no/rogaland/se-tv-sendingen-fra-rogaland-1.15200923, kaj prezentita en Facebook: https://m.facebook.com/story.php?story_fbid=10157362571112021&id=191000862020.

6. Vortara laboro

Jørgen Bosoni ŝajne ne pretas diskuti la detalojn rilate al la projekto. Herman kaj Jardar klopodos esplori pri la afero. La estraro volas superrigardon pri la nuna stato, kiel bazon por diskuti kion plu fari pri la projekto.

7. Pri la nordiaj E-gazetoj

Estas nun interkonsentite, ke membroj de SEF havu aliron al NE-isto kaj membroj de NEL havu aliron al la sveda organo. **Decido**: Jardar esploros, kiel facile distribui ĝin, ekz tra la retpaĝo de NEL.

Ekestis diskuto, ĉu havas sencon ŝirmi la retan version de Norvega Esperantisto per pasvorto? Ĉu entute ni havas ion kion ni ne volas montri al eksteruloj?

La ĉefa argumento por ne publikigi NE-iston, estas, ke ĝi konsistigas la ĉefan oferton, kiun donas la membrokotizo. Ĉu ni perdus membrojn se la gazeto estus senpage havebla rete? Aŭ ĉu ne gravas? Ni ne konkludis.

Sendepende de NE-isto, povas esti aliaj informoj kiuj ne estu alireblaj de eksteruloj.

8. Statuttendringar for Rolf Uhlens legat

Styret i Norsk Esperanto-Forbund (NEL) mottok 18. oktober 2020 framlegg til reviderte statuttar datert 6. oktober for Rolf Uhlens legat frå legatstyret. NEL har og fått framlagt grunngjeving for dei føreslegne endringane.

Ut frå dei eksisterande statuttane, skal endringar godkjennast av «de to medvirkende forbund».

Vedtak: Styret i Norsk Esperanto-Forbund godkjenner statuttendringane for Rolf Uhlens legat, datert 6. oktober 2020.

En Esperanto: 8. Statutŝanĝo de Legaco Uhlen

La estraro de Norvega Esperantista Ligo (NEL) ricevis la 18-an de oktobro 2020 de la legaca estraro proponon datitan la 6-an de oktobro pri nova statuto de Legaco Rolf Uhlen. Al NEL ankaŭ estas prezentitaj la argumentoj por la proponitaj ŝanĝoj.

Laŭ la nuna statuto, ŝanĝojn aprobu «la du kunlaborantaj ligoj».

Decido: La estraro de Norvega Esperantista Ligo aprobas la statutŝanĝojn por Legaco Rolf Uhlen, datitajn la 6-an de oktobro 2020.

9. Eventualaĵoj

a) Nuligo de Skandinavia kongreso 2021

Ni ĵus ricevis sciigon, ke la Tria skandinavia kongreso planita por majo 2021 estas prokrastita al 2022 aŭ 2023 pro la malklara virusa situacio. Sekve, ankaŭ nia landa kongreso ne okazos (parte) en Danujo kiel planite.

La estraro diskutis plurajn eblecojn. Ĉu estu virtuala aŭ ĉeesta landa kongreso, ĉu ni havu la samajn datojn aŭ prokrastu ĝin?

Decido: Mario informos la Oslo-klubon kaj petos iliajn opiniojn. La estraro pludiskutos la aferon en la venonta kunsido.

b) Operasjon Dagsverk

Claude informis, ke bedaŭrinde ne okazos Esperanto-aktivado dum Operasjon Dagsverk en Tromsø. La ĉefa kialo estas, ke pro deviga laboro kaj forvojaĝoj ne estas sufiĉe da homoj, kiuj povos gvidi la gejunulojn dum tiu tago. La klubo de Tromsø provos denove venontjare.

La interkonsiliĝo daŭris de 20:30 ĝis 22:30.

La venonta interkonsiliĝo okazos ĵaŭde la 26-an de novembro je 20:30 per Zoom.

Protokolis Bård Hekland